

# ***Kluba Bulteno***

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

**N-ro 1 2019**

**Mardon la 15an de januaro**

**67a jaro**

---

## **Kalendaro**

Ĉiuj vesperaj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

### **Lundon la 21an de januaro** (semajno 4) *mandag*

Ĉu doni monon al rumanaj kaj aliaj almozpetantoj surstrate? Aŭ al senmonaj afrikaj e-istoj kiuj petas retroŝte? Ni vivas en abundo, ili mizere: jen morala dilemo. Ĉu pli bone subteni tra helporganizoj?

*Skal man gi penger til rumenske og andre tiggere på gaten? Enn til fattige afrikanske esperantister som tigger på e-post? Vi nyter overflod, mens de har knapt nok til å overleve: et moralsk dilemma. Er løsningen heller å støtte gjennom humanitære organisasjoner?*

### **Mardon la 5an de februaro** (semajno 6) *tirsdag*

Studkunveno. Ni pludiskutos malnetan tradukon de broŝuro pri malnovaj metioj.

*Studemøte. Vi fortsetter å diskutere et utkast til oversettelse av en brosjyre om tradisjonelle håndverksyrker.*

### **Lundon la 18an de februaro** (semajno 8) *mandag*

Renkontiĝo kun novuloj. Ni interkonatiĝas kun novaj membroj kaj ret-kursanoj, kaj respondas iliajn demandojn. Vidu ankaŭ dorspaĝon.

*Møte med nye interesserte. Vi blir gjensidig kjent med nye som lærer på internett-kurs, og vi svarer på deres spørsmål. Se også baksiden.*

### **Mardon la 5an de marto** (semajno 10) *tirsdag*

JARKUNVENO vd. p. 3

ÅRSMØTE. Se s. 3.

### **Lundon la 18an de marto** (semajno. 12) *mandag*

Kial subvencii veturadon per aŭto aviadilo? demandas Kjell Peder Hoff.

*Hvorfor subsidiere reiser med bil og fly? – spør Kjell Peder Hoff.*

---

*MØTENE VÅRE foregår hovedsakelig på esperanto, for vi trenger å praktisere språket. Men vi prøver å ta hensyn til alle deltakernes behov. Vi mottar statsstøtte gjennom Studieforbundet Næring og Samfunn, etter studieplanen "Esperanto konversasjon".*

# OKAZIS

## **La Lisbona UK (4.9)**

La Universala Kongreso en Portugalio: Otto Prytz donis ampleksan trarigardon – de A ĝis Z (aŭ almenaŭ V) – de la multegaj prelegoj, organizaj diskutoj, kulturaj aranĝoj kaj aliaj kunvenoj dum la kongresa semajno. Malgraŭ diversaj praktikaj malhelpoj li sukcesis ĉeesti kaj prikomentis multajn kaj kelkajn eĉ gvidis.

## **Somera E-Studado en Slovakio**

(17.9)

Havante bazajn sciojn de Esperanto per kurso en interreto kaj kun subvencio, ankaŭ de la kluba Fond-aĵo Gustavsen, Alexander Harestad partoprenis en Somera E-Studado en Slovakio, internacia aranĝo kiu ĉiujare ekde 2007 celas renkontigi kaj paroligi retlernantojn. Li raportis – en Esperanto – pri riĉa kaj bone organizita programo, ankaŭ kultura kaj aktiva .

## **Studkunveno (2.10)**

Ni daŭrigis nian tradukadon de *Malnovaj metioj*.

## **Kun Aleksej Salomatov el Moskvo (5.10)**

Kromkunveno kun nia gasto Aleksej Salomatov el Moskvo. Ekde la 90aj jaroj lia firmao aranĝis karavanojn al E-kongresoj kaj turismajn vojaĝojn en la nordiaj landoj, sed nun pro la ekonomiaj

kaj politikaj kondiĉoj en Ruslando mankas klientoj. Tamen li esperas pri pliboniĝo de la situacio kaj intertempe okupiĝas ankaŭ pri fotado kaj filmado.

## **Rikolto el Pollando kaj Italio (15.10)**

Kjell Peder sukcesis partopreni precipe en la kultura parto de la kongresoj de IFEF kaj PEA (en Pollando) kaj de la itala (en San Marino), malgraŭ diversaj praktikaj malhelpoj. Li rikoltis riĉan kolekton da kajeroj, mapoj kaj flugfolioj pri diversaj E-organizoj kaj aĉetis tri legindajn numerojn de la nova (brazila) periodaĵo *Heroldo*.

## **Landnomoj (6.11)**

En nia "regula" Esperanto la landnomoj estas embarase neregulaj, sed (ĉu?) konsole Otto konvinke montris ke la norvega lingvo – kaj ekz-e la hispana – estas eĉ pli ĥaosaj tiurilate. La Akademuo faris siajn rekomendojn pri la nomoj de ĉiuj landoj de la mondo kaj ties loĝantoj, kun atento al la konfliktaj konsideroj de internacieco, rekon-eblo skriba/parola kaj konformo al la Esperanta fonemaro.

## **Studkunveno (19.11)**

Ni daŭrigis nian tradukadon de *Malnovaj metioj*.

## **Vizito al Nepalo (4.12)**

Asbjørn Lindh ricevis inviton de amiko al Katmanduo en Nepalo kaj

li utiligis la okazon por konatiĝi kun la loka E-klubo. Ties viglan agadon nutras la internacia partopreno de la ĉiujara Speciala Ekskurso aŭ Himalaja Renkontiĝo). Aliajn amikojn li vizitis en Lodzo, Pollando, kaj ankaŭ tie lia ĉeesto helpis malkrokodiligi la kluban medion.

## Literatura kunveno (17.12)

La ĉeestantoj prezentis librojn: *La serĉo de la perfekta lingvo* de Umberto Eco; julfabelo kiu ne enlibriĝis; kaj artikolaro kiu jes libriĝis: "*Dek kvin jaroj da Lingvaj paĝoj el Norvega Esperantisto 1990 – 2005*".

---

## Jarkunveno / Årsmøte, mardon / tirsdag 5. marto Tagordo / Dagsorden

- |  |  |
|--|--|
| 1. Aprobo de la kunvoko  | 1. Godkjennelse av innkallingen.   |
| 2. Elekto de prezidanto de la kunveno kaj de protokolanto.   | 2. Valg av møteleder og referent.  |
| 3. Jarraporto (Ni antaŭsendos ĝin retpoŝte, kaj paperpoŝte al tiuj kiuj petos ĝin.)  | 3. Årsrapport (sendes ut som e-post. Papirutgaven sendes til de medlemmene som ber om den).  |
| 4. Jarkalkulo (same)   | 4. Årsregnskap (sendes på samme måten)   |
| 5. Eventualaj ricevitaj proponoj*.   | 5. Eventuelle innkomne forslag*.   |
| 6. Elekto de estraro**, revizoro kaj reprezentanto en la domkomisiono, ĉiuj kun anstataŭanto(j). Ankaŭ de nova elekta komisiono. | 6. Valg av styre**, revisor og representant i huskomiteen – alle med vara – samt valgkomité. |

\* **Proponoj** atingu la estraron tri semajnojn antaŭ la jarkunveno *tre uker før årsmøtet*, do ĝis merkredo la 13a de februaro (semajno 7).

(Por proponoj de statutŝanĝoj la limdato estis la 10a de januaro.)

\*\*Mankas anstataŭantoj por la revizoro kaj la domkomisiono.

---

## Kromekzempleroj

En la klubejo ni havas grandan kolekton da kromekzempleroj de internaciaj periodaĵoj el la lastaj jaroj: *Heroldo*, *Sennaciulo*, *Literatura Foiro*, *Kontakto* k.a. Senpage preneblaj!

# Informkunveno por *Duolingo*oj k.a.

Neniu novulo venis al niaj lastaj informkunvenoj. Ni petis la kontaktulon de UEA turni sin al *Duolingo* kun pledo por pli efika afiŝado.

Ni invitas al nova informkunveno por *Duolingo*oj kaj aliaj novuloj lundon la 28an de januaro je la 18a. Ankaŭ en februaro kaj marto la lastan lundon de la monato. Cetere ni prenas la duan kluban kunvenon en februaro (lundon la 18an) por interkonatiĝo kun novaj interesiĝantoj.

---

## Informbudoj en foiroj?

Info-budoj en foiroj k.s. donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto – kiel ekzemple en la Mela-festivalo (aŭguste ĉiujare). Ofte jun(et)uloj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. **Se vi scias / aŭdos** pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), **bv. sciigi tion al ni.**

**Viktig:** *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling. Eller et lokalbibliotek som er motakelig. Folk vet ikke at Esperanto finnes!*

---

## Ĉu iu volas lui kunvenĉambrom? – leie møterom?

Nia kunvenejo estas ofte neuzata, sed taŭgus por kunvenoj de malgrandaj grupoj aŭ – post rearanĝo de la mebloj – ĝis ĉ 20 homoj. Ekz-e por loka sekcio de tutlanda organizo. Alloga povas esti la rekta eniro el la strato. Ĉu vi konas iujn kiuj bezonas kunvenejon?

*Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder.*

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18\*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94  
Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 5 Ringen (ambaŭ direktoj) – aŭ 4 de Vestli – al Sinsen. Vd. pli ĉe [esperanto.no/oslo](http://esperanto.no/oslo) => "vojklarigo".  
\* inng. Schouterrassen. [www.esperanto.no/oslo](http://www.esperanto.no/oslo) Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)  
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper